


OBSAH — ENHAVO:

BOHEMA UNIO ESPERANTISTA.

NIA LITERATURA KONKURSO.

TRI REĜOJ.

VAMPIRO.

UNUA LEGOLIBRO.

PŘÍLOHA Č. Č. E. I.

KRONIKA. KRONIKO NACIA.

BIBLIOGRAFIO.

TELEFONO.

1907 **LISTOPAD, PROSINEC — NOVEMBRO, DECEMBRO.** I. 9. 10.

# TOTO DVOJČÍSLO prodává se po 70 h.

---

**Oficiala organo de bohemaj Esperantistoj**

# Časopis Českých Esperantistů

vychází 10krát ročně (kromě srpna a září). | eliras monate (krom aŭgusto kaj septembro).

Redaktor: **Ed. Kühnl.**

Předplatné (ročně 3 K pro Rakousko, Fr. 3·75 pro cizinu), a vše týkající se časopisu, budiž zasláno pouze na adresu: „Časopis Ceských Esperantistů“, Praha II. (Poštovní známky všech států přijímají se v plné ceně.) Redakce vyhražuje si právo upraviti články pro tisk. Netištěné rukopisy se vrátí, byla-li přiložena známka; pracem původním dána přednost. Abonpago, akceptata por almenaŭ unu jaro (Fr. 3·75 = 1,50 Sm por fremdlando, 3 K por Aŭstrio), kaj ĉio, kio koncernas la gazeton, estu sendata nur laŭ la adreso: „Časopis Českých Esperantistů“ en Praha II. (Bohemujo-Aŭstrio). (Poŝtmarkoj de ĉiuj ŝtatoj estas akceptataj plenvalore.) La redakcio rezervas por si la rajton korekti la manuskriptojn por la preso; la nepresitaj manuskriptoj estos redonitaj, se oni almetis poŝtan markon. Originalaj artikoloj estos ĉiam prefere akceptitaj.

*** ***

**Avizo:** Nia redakcio ĵus eldonis **trian** serion de novaj propagandaj poŝtkartoj, presitaj sur glata, blanka papero; sur duono de ilia adresflanko estas malgrandigita la bildo, kiu ornamas nian revuon, la alia flanko estas rezervita por la sciigoj.

Prezo (afrankite) de ĉi tiuj poŝtkartoj estas: 10 ekz. 15 hel., 25 ekz. 30 hel., 50 ekz. 60 hel., 100 ekz. K 1·15 (Pagu per poŝtmarkoj).

Esperantajn gazetojn ni petas pri afabla interŝanĝo; atentigo: bohema č = ĉ esp.! Ni petas ĉiun, kiu havas superfluajn ekz. de Č. Č. E. sendi ilin al ni, ĉar nian provizon elĉerpis la specimene sendataj ekz. de unua kaj dua numeroj kaj nun ni posedas nur tre malmulte da ili por novaj abonantoj.

---

**PŘEDPLATNÉ NA ROK 1908** v administraci 3 K.

---

# BOHEMA UNIO ESPERANTISTA.

Sekretario de prepara komitato: S-o Ctibor en Praha-Karlín, 491. BOHEMUJO.
Laŭ tiu ĉi adreso oni sendadu ĉion **kio koncernas la Union.**

---

**„Klub Esperantistů v Praze“**, zal. r. 1902. Roční příspěvek 4 K. Pravidelné členské schůze vždy ve středu večer ve spolkových místnostech restaurace „u Donátů“. Praha II. Spálená ul.

# PŘEHLED REVUÍ

(red. Přemysl Ot. Plaček)

jest vždy čtrnáctidenním zhuštěným přehledem myšlenkového obsahu přes 60 českých revuí. Postupně budou připojovány i revue cizí. Kdo nemá času a příležitosti nebo prostředků čísti všechny tyto revue, najde v „Přehledu Revuí“ znamenitého ukazatele a jest rychle a přesně o všem informován. Cena jest velmi levná při obsahu tak cenném, bohatém a pestrém. Předplácí se na čtvrt roku toliko 2 K 40 h i s poštou, do ciziny 3 K.

Žádejte číslo na ukázku v každém knihkupectví, jakož i v **nakladatelství „Přehledu Revuí“** v Pacově, Myslíkova ul. č. 12.

## LA REVUO.

Monata literatura gazeto internacia kun konstanta kunlaborado de **Dro Zamenhof**; ĉe Hachette & Cie., 79. Bd. St Germain, Paris, kaj ĉe ĉiuj ĝiaj korespondantoj. Jare 7 Fr. (2,75 Sm).

## Majstro Jan Hus.

La vivo, agado, kondamno kaj morto de glorinda martiro.

**Prezo 80 h. (34 Sd).**

J. F. KHUN,
Vrsce-Kopidlno, Bohemujo.

## Tra la mondo.

Tutmonda revuo esperanta Ĉiuj temoj. Ĉiuj landoj. Multaj ilustraĵoj. Ĝi estas gazeto familia kaj de la grupoj, kluboj civilaj, kazinoj militaj, hoteloj k. a.

INTERNACIAJ REKLAMOJ.

Jara abono 8 K (3,20 Sm). Specimeno 75 hal. (3 intern poŝtm.) Ĉe „Tra la mondo“ Meudon (S. & O.) France.

## Lingvo Internacia,

monata centra organo de la Esperantistoj, 48 paĝoj (13 × 20 cm.), nur en Esperanto. Literatura aldono 16 paĝoj.

Jara abono: Fr. 7·50 (3 Sm).

Administracio: Presa Esperantista Societo, 33, rue Lacépède. Paris.

# Kavárna „Union“ Kafejo

## Praha I. Ferdinandova třída,

**Středisko Esperantistů.**

Telefon 2957.

Ne forgesu viziti en PRAHA la **esperantistan kunvenejon** en kafejo „UNION“.

**Fr. Davídek.**

Partoprenu en la KONKURSOJ de

# LA REVUO.

Unu konkurso ĉiumonate!

Unua konkurso: Verki literaturan finon al la rakonto aperinta en n-o 14. de La Revuo.

„Ĉu virgulino aŭ la tigro.“

Dua konkurso: Voĉdonado pri la plej bona stilisto en Esperanto.

**LEGU LA KONDIĈOJN EN LA REVUO.**

# Vinné sklepy knížete Jiřího z Lobkowicz
## na Mělníku.

Plej granda vinkulturo en Bohemujo; 56 ha da vinberejoj.

En multaj ekspozicioj premiita.

Mendu la prezaron!

---

**V „Illustrovaných Přednáškách“** byla vydána čísla 78., 79., 80.: Přirozená ochrana housenek (36 h); 81.: Čím se živíme? (12 h); 82., 83.: Kometa Halleyova (24 h); 84., 85.: Zotročený svět drobnohledný (24 h); 86, 87.: Zásluhy Hellenů o vědy (24 h); 88. 89.: O rakovině (24 h); 90., 91.: Jiná slunce. Cizí světy (24 h).

Mimořádné přednášky obsahují nová čísla: 15., 16.: Otázky živnostenské (24 h); 17, 18.: Analysis situs, projektivní a Euklidova geometrie (24 h); 19., 20.: Sedmý zemědíl (24 h).

Předplatné na 50 čísel „Ill. Přednášek“: 4 K 80 haléřů. Předplatitelé dostávají s přednáškami i přílohu, obsahující časové novinky vědecké ve formě feuilletonu, hlídku abstinentní a rubriku esperantskou.

Předplatné na 50 čísel mimořádných přednášek 4 K 80 hal. (pro předplatitele „Ill. Přednášek“ 4 K).

Dr. A. Baťka: **Příručka chemické technologie** vychází v sešitech po 24 h. Předplatné na 20 sešitů 4 K u administrace „Illustrovaných Přednášek“ v Plzni.

---

**„ČESKÉ MLÁDEŽI“** vychází vždy 1. každého měsíce mimo červenec a srpen v P. Ostravě. Při nejméně 10 výtiscích číslo za 4 h (2 kr.), při méně výtiscích za 6 h. Při zasílání jediného čísla poštou je číslo za 8 h. **Vše zasílá se vyplaceně.**

Veškeré objednávky, předplatné, reklamace, jakož i literární příspěvky zasílány buďte na adresu: **Rudolf Eliáš, učitel v Polské Ostravě, R. Slezsko.**

---

# Fr. Rohlíček

Plzeň, Školní ul. 18. Bohemujo.

**Fabrika sortimento de drapoj.**

Anglaj novaĵoj:
**Kravatoj „Esperanto“.**
**Kolumoj „Esperanto“.**
**Manumoj „Esperanto“.**

Moderaj prezoj. Specimenoj afrankite. Oni korespondas en lingvoj: bohema, germana, franca, angla kaj Esperanto.


---

Eldonanto: Ed. Kühnl. — Presejo de K. Pitter, Praha.

# BOHEMA UNIO ESPERANTISTA.

Nenio povas atesti pli bone urĝecon de Unio ol leteroj sendataj de niaj societoj en kancelarion de prepara komitato. Kiel ni jam sciigis, estis elektita tiu ĉi komitato la 30-an junion (vidu pĝ. 87.), kaj ĝiaj membroj interkomunikis tuj post libertempo; prezidando estis elektita s-o dr. Palek, sekretario s-o G. Ctibor, kasisto s-o J. Grňa. Kun bedaŭro ni devis konstati, ke mankis dezirinda harmonio inter la komunsocieta ideo — fondi Union de societoj — kaj inter du membroj de komitato starigita por realigi tiun ĉi ideon! Kvankam la prezidanto akceptis la funkcion, li tamen eksiĝis jam antaŭ komenco de laboroj, deklaraciinte, ke li estas indiferenta je Unio, kies bezonon li mem ne vidas Krom tio la kasisto, proponita kaj elektita kiel forestanto, respondinte je unua letero de sekretario, sciigis, ke li povas pro urĝa okupo interrilati kun li nur post ia tempo. La tutan aferon vere minacis senkaŭza prokrasto ĝis dato nefiksita aŭ — forgeso. Ni povas danki sole al sekretario de la komitato, kiu entreprenis ĉiujn laborojn bezonajn, ne timinte sian izoliĝon. Laŭ rekomendo de la suprenomita kunveno li elektis inter membroj de Esperantista Klubo en Praha du kunlaborantojn, kun kiuj li elverkis proponon de regularo. Apenaŭ diskoniĝis scio pri la malfermo de „Kancelario de Prepara Komitato“ kaj apenaŭ fremdaj gazetoj esperantaj enpresis unuajn noticojn pri ĝi, la vera funkciado disvolviĝis. Krom internaj aferoj estas prizorgita starigo de rondiranta ekspozicio, kiu enhavas jam, laŭ raporto de s-o Ctibor, donita en la kunveno de 1-a decembro, tri cent tridek numerojn (enkalkulante du cent ilustritajn poŝtkartojn). Tiu ĉi ekspozicio estis sendita dum lastaj du monatoj al societoj en Jičín, Prostějov, Králové Dvůr, Osek, kaj Praha; ĝi povas esti mendita ankaŭ por certa tempo, antaŭe difinita. Regularon kaj nomaron de enhavitaj objektoj sendas la komitato. — Kiam nia redakcio eldonis la propagandajn flugfoliojn (represaĵon el tiu ĉi numero), dissendis la kancelario grandan nombron da ili al ĉiuj membroj de esperantistaj bohemaj societoj.

Fininte mem ĉiujn laborojn, s-o Ctibor kunvokis en nomo de prepara komitato reprezentantojn de ĉiuj societoj al **kunveno okazinta la 1-an decembron en kafejo Union en Praha.** La kunveno, en kiu li proponis la ellaboritan regularon, estas decidiga por la estonta agado de nova, tie elektita komitato.

Siajn reprezentantojn sendis kluboj kaj societoj el Praha (virina grupo), Plzeň, Prosek, Č. Budějovice, Kukleny, Brno, Osek, Jičín, Prostějov kaj Tábor. Sub lerta prezidado de s-o J. Pohl, sekretario de Esperantista grupo en Plzeň,

la laboroj rapide antaŭeniris, tiel ke la nemultaj meztagaj horoj estis plej bone profititaj. Raporto de sekretario s-o Ctibor estis aŭskultita tre atente; laŭ ĝi oni ekciis, ke la arĥivo de korespondaĵoj enhavas jam pli multe ol 300 leterojn. Interalie li klarigas ankaŭ sian izolitan situacion en la komitato: s-o Grňa (kasisto), kiu ĉeestis tiun ĉi kunvenon, sendis al li sian unuan sciigon pri la afero mem nur du monatojn post la suprecitita senkulpiĝo, kaj tiu malfrua sciigo estis rekte kontraŭa al tasko, kiun oni estis metinta je prizorgo al tuta komitato. Tralegînte kelkajn pli gravajn leterojn, li atentigis pri la rondiranta ekspozicio kaj ĝia ĝisnuna servo. Post vortoj de s-o E. Kühnl, kiu aludis gravecon de Unio kaj ĝian estontan laboron oni legis la proponon de regularo, kiu estis senŝanĝe akceptita. La nomo de Unio estis elektita: „Bohema Unio Esperantista" aŭ boheme „Unie Českých Esperantistů." Ĝia aktiva membro povas fariĝi sole bohema societo esperantista; tiu nomos poste siajn du delegitojn. La Union administros komitato elektita de ĝenerala ĉiujara kunveno kaj la delegitaro. Ĉiu societo reprezentota en la Unio pagos por ĉiu sia membro 40 hel. jare. Oficiala organo de Unio estis nomita „Časopis Ceských Esperantistů" proponita de s-o Ctibor kaj rekomendita de s-oj J. Jelínek el Kukleny kaj S. Balík el Plzeň. — La plena regularo, sendita al ministrejo, por ke ĝi estu leĝe aprobita, estos represita en nia gazeto. — Membroj de komitato estis elektitaj s-oj: Ing. Sitko (en Brno) prezidanto, G. Ctibor (en Praha) sekretario kaj F. Svačina (en Č. Budějovice) kasisto. Tiu ĉi „Trio" kunmetita el samideanoj konataj de ĉiu, kiu sekvas nian boheman movadon en Bohemujo kaj Moravio, estas la plej konfidinda certigo, ke la gvido de Unio kaj ĝia sorto ne povas esti en pli bonaj manoj.

Antaŭ fermo de kunsido oni prezentis jenajn proponojn: „Unio, alpreninte en sia regularo paragrafon, ke ĝi sekvos ĉiam la Fundamenton de Esperanto, protestu kontraŭ ĉia alproprigo de rajto fari ian ŝanĝon en nia lingvo" (S-o J. F. Khun el Jičín). Al nia majstro, dr. Zamenhof, estu sendita letero, informonta lin pri la rezultatoj de tiu ĉi grava kunveno (S-o E. Batěk el Osek).

Ni povas nun atendi novan epokon de nia ideo en nia lando, ĉar la cirkonstancoj rimarkeble jam ŝanĝis situacion de Esperanto ĉe ni.

Dum la ĝenerala propagando centriĝis en la komenco en kluboj de Praha kaj Brno, estis nun donita iniciativo de pli vigla movado per fondado de grupoj, kiuj fariĝas novaj gravaj centroj de organizado. Tiu sistemo, ĝis nun bona, ne povos taŭgi por tempo estonta. Estas dezirinde, ke ankaŭ la ceteraj grupoj, kiel la

unuaj kluboj mem, havu egale da influo kaj egale da respondeco por la gvidado de komunaj interesoj.

Prosperadu Unio, fondita laŭ volo kaj interkonsento de ĉiuj bohemaj kluboj esperantistaj!

*Nova adreso de Prepara Komitato*: Bohema Unio Esperantista en Praha (Karlín 491. S-o Ctibor, sekretario de Prepara Komitato).

## NIA LITERATURA KONKURSO.

Rezultato de nia konkurso ne estas tiel kontentiga, kiel ni atendis; kvankam ni precize definis la kondiĉojn, tamen ni konstatas kun bedaŭro, ke neniu el alsenditaj laboroj respondas ĉiujn postulojn plene.

I. **Bohema propaganda flugfolio,** eldonita kaj dissendita jam en monato novembro al membroj de ĉiuj bohemaj societoj esperantaj, ne estas laŭvorta kopio de iu el ricevitaj du laboroj, ĉar aŭtoroj de ambaŭ preterlasis la fakton, ke Esperanto posedas jam riĉan bibliotekon, gazetojn kaj — gramatikon, pri kiu ni parolis sur pĝ. 111 per vortoj „lingva fundamento“. Kiel artikoletoj propagandaj (en ĵurnalo bohema) taŭgas ambaŭ, sed ne kiel detala informa artikolo. Tial ni duonigas la premion kaj sendos gazeton T. la M. al „Zelená *“ ceterajn librojn al „Fervora propagandisto“ (post ricevo de iliaj nomoj kaj adresoj).

II. **Esperanta artikolo.** Ni bonvenas la maloftan okazon, kiam ni povas servi al niaj amikoj per kelkaj sinceraj vortoj koncerne uzadon de nia lingvo. Ni represas tial el „Revuo Internacia“ ĉiam valorajn dek konsilojn al esperantaj tradukantoj:

1. Ne traduku por preso, se vi ne ellernis ankoraŭ Esperanton. 2. Traduku sole el via propra lingvo. 3. Ne traduku tradukaĵojn. 4. Ne traduku malnovaĵojn. 5. Ne traduku trivialaĵojn virtajn kaj malvirtajn. 6. Ne traduku ne konatiĝinte kun la nova literaturo de via propra lingvo, kun ĝiaj tendencoj kaj formoj 7. Memoru, ke perloj de literaturo malofte troviĝas en familiaj ilustritaj revuoj. 8. Memoru, ke krom etimologio ekzistas ankoraŭ sintakso. 9. Plej ofte distranĉu frazojn per punktoj, plej ofte disŝiru kunmetitajn vortojn. 10. Ne traduku versojn, ne ellerninte regulojn de versofarado entute, kaj de l' esperanta aparte.

Tiuj ĉi neforgesindaj konsiloj klarigos certe sufiĉe la kaŭzon, kial eĉ artikolo konvene longa (4—8 pĝ.) estis rifuzita kaj laboroj — neplenumantaj tiun ĉi kondiĉon — estis akceptitaj.

**Unuan premion** ni aljuĝis al laboro signita Ŝ. M. K.: Tri reĝoj. **Duan** al laboro: Vampiro (Devizo „Mi“.) Ambaŭ estas tradukitaj el J. Neruda.

Por doni konsilon, el kiu oni povas ĉerpi samtempe instruon, ni citas kelkajn erarojn pli ofte ripetitajn.

Devizo: K a r a a m i k o. „Doktoro Ĉiofuŝa“. (Honora cito.) Stilo bona, pruvanta lertecon de aŭtoro, estas tamen kelkfoje „vundita“ per netaŭga esprimo. Ekz. kamerado (kamarado), elstreki manon (etendi, streĉi) . . . Estas rimarkebla, ke aŭtoro legis jam multe en nia bona literaturo esperanta.

Devizo: T i r o l a n o. „Malriĉaj homoj.“ Bonstile tradukita traduko de prozigita franca poemo! Nemultaj, sed tamen korektindaj eraroj: Edzo devas maron(?) . . . de temp' al tempo eĉ forta ekkrio oni povas aŭdi (fortan ekkrion) . . . la viro de Johanino (edzo) . . . du infanoj ŝi havas (n) . . . mi nek memoras tian nokton (mi eĉ ne) . . .

Devizo: B o h e m o. „Repacigo“. Kelklinia (tro mallonga) propono pri praktika uzado de Esperanto ĉe aŭstriaj nacioj (sia anstataŭ ilia!)

Devizo: G r a f i k i s t o. „Litografa fako sur artmetiaj lernejoj.“ Interesa nelonga raporto. Proceduro (procedo)... priskribi tiu ĉi lernejo (tiun ĉi lernejon) . . . sur ekspozicio (en)... museo (muzeo) . . . ili laboras kune kun en la (kune en) . . .

Devizo: P r o v o d e k o m e n c a n t o. „La vagema regimento,“ tradukita el bohema lingvo, pruvas penadon de aŭtoro, konservi stilon de la originalo. Tamen kelkaj eraroj, iom gravaj, surprizas en teksto facile legebla. Estis jam ses da horoj (sesa horo, ses horoj) . . . post lin (za ním!) (post li, aŭ linsekve) . . . Leviĝis (li levis) manon por tordigi liajn (siajn) lipharojn . . . vortoj, per kiujn (kiuj) li . . . alportiĝis sciigojn (sciigoj) . . . ekscii pri nenion (nenio) . . . kiel ili ekfalus en akvon (kvazaŭ falintaj) . . .

Devizo: V e r d s t e l u l o. „Sur Olimpo“ . . . distagiĝis (tagiĝis) . . . morgaŭstelo (matenstelo) . . brilanta ringegeto sur kapo (aŭreolo) . . . sur eternoj (eterne, por ĉiam) . . . kaj ne atendante (kaj atendante) nek demandojn nek juĝon . . . kolumnoj(?) . . marmuro (?) . . li vertis sin al Paŭlo (turniĝis) . . . Kio li aŭdinta, ekkriis kaj disventiĝis (tion aŭdinte, aŭ kiam li tion aŭdis, li . . .) . . . Paŭlo metis manojn sur glavo sur ili kapon kaj pensis profunde(?). Fine leviĝis: trankvile faris signon de l' kruco . . . (li!!) Juĝante laŭ eraroj faritaj en tiu ĉi tradukaĵo (el Sienkiewicz), ni opinias, ke aŭtoro de alia ricevita verko — „Rido“ (devizo: E s p e r u l o) estas la sama persono. O f t e forgesataj subjektoj. Kial ili ĉi-tio faras . . . tiel kiel li tio-ĉi faris (tiel, kiel . . tion) . . . eltirante manetojn al ŝi (streĉante aŭ etendante kontraŭ ŝi braketojn?) . . . vante (vane) . . . rikoni (?) . . . Kiel per elek-

trika fajrero tuŝita stariĝis (elektra, li) . . . mi do estas bona por vi (mi tamen estas bona kontraŭ vi (?).

Devizo: Osvětou k svobodě. „La fiŝkaptisto kaj la spirito" . . . ke li elnutru la virinon kaj tri infanoj — lian familion (infanojn — sian) . . . ĉiu tago li iradis (ĉiun tagon) . . . li iris dum luneto (dum lunbrilo) . . . plimulte lokoj (da) . . . sed li ne trovis nenion (li trovis nenion) . . . li malĝojigis sin el tiotre (?) . . . mi eliris el domo, ke mi trovus tie ĉi vivadon (trovu) . . . tra ĉion zorgon kiun al li turnas, mi ne povas al mia familio nek tiu plej pemaj bezonecoj provizigi (?) . . . turmenti homoj, laŭdi tiuj, havi virtoj, aŭdi tio (n!!!) . . . li eltiris nenion ol ŝeloj kaj koton (!) . . . ne mankis multe ke li en la grandeco de lia (sia). malfeliĉo la racion perdis . . . restas al mi la unua ĵeto (jediný = sola) . . . vazo, de kiu li laŭ pago pensis (pri kiu, pezo aŭ eble laŭ kies pezo) . . . neniam mi ne volas (mi volas) . . . nominante min fieran spiriton (nomante min fiera spirito) . . . Ĝus (ĵus) . . . Ne ajn (neniel) . . . pruvi servon (prokázati službu, fari servon) . . .

La sola originala laboro „La realeco" (devizo: Monda unuiĝo) enhavas ofte ripetatan kaj strangan eraron: superfluajn akuzativojn eĉ post prepozicioj. Por presisto estus neeble tralegi la mikroskopan manuskripton — en okazo se ĝi estus presata. Kiel multe homoj (da homoj) . . . Sed kion (kio) restis el tiujn (tiuj) . . Oni ŝajnas (ŝajnas) ke ĝi ne deziras . . . oni edukas generaciojn per librojn (libroj) . . . elektado de la librojn (libroj . . . vi havas mil kaŭzoj (kaŭzojn) . . . sub la malfacilajn premojn (malfacilaj premoj, de naturo . . . naturo mem faras ĉi tiu (ĉi tiun) malpaco (malpacon) . . . vi devas rigardi sin (vin) mem . . . ne ĉion (ĉio) oro, kion (kio) brilas . . . Tiujn ĉi kavalirojn posedas la mondo jam tiom da, ke ili (La mondo posedas jam tiom da ĉi tiuj kavaliroj, ke ili) . . . Eliras (li) kaj jen: . . . multa (kelkaj, multaj) disrompis siajn dentojn sur ĝi . . . ĉion ceteran (ĉio cetera) forkuras.

Tiom ni volis kaj devis diri al niaj nekonataj amikoj, kiuj certe akceptos la kritikon sinceran sincere. Neniu diru, ke li ne estas kapabla fari ion pli bonan; ne forgesu, ke la eraroj instruas

## TRI REĜOJ.

El „Žerty hravé i dravé" de J. Neruda. 1877.*)

Mi meditas je „Tri reĝoj." Ĵus antaŭ duonhoro ili estis ĉe mi. Ili ekfrapis nobelece kaj apenaŭ mi malfermis la pordon, ili mem

*) En Bohemujo, same kiel en kelkaj aliaj landoj, iradas la 6-an januaron (je festo de tri reĝoj) infanoj de domo al domo, kantante ili „imitas" la tri reĝojn, kiuj, laŭ biblio, iris Betlemon. La kutimo malaperas jam, precipe en urboj.

prezentiĝis per vortoj: „Ni tri reĝoj, ni iras al vi!“ — Al Vi! Kaj mi opiniis, ke reĝoj diras al ĉiu „ci“!

Mi repaŝis honorestime en la ĉambron kaj ili min sekvis. Tuj apud la pordo ili ekhaltis, eble ŝajnis mia simpla ĉambro tro malriĉa al ili. Sed mi, venkita per impreso nekutima — reĝoj malofte min vizitadas — faletis sur la seĝon. Ili staris kaj kantis. Mi aŭskultis, observis — eĉ enigis okulojn en iliajn majestajn reĝajn staturojn. Ĉiu el ili estis majesta iom pli ol unu kubuto. Kaj ŝajnis al mi, kvazaŭ flugilo de majesteco blovus tra mia ĉambro.

Ili finkantis kaj silento ekregis; iom ĝeniga, mi konfesas. La monarĥoj rigardis unu la' alian, ekbalancis sur dekstra kaj maldekstra piedoj kaj sur iliaj vizaĝoj aperis ia timemo. Tio estas tute natura, ĉar vere „tre timeme oni staras homarestre“, estas skribita ĉe Grillparzer. Mi sentis, ke fine mia devo estos decidiĝi kaj komenci. Sed jen pri kio tuj ekparoli!

„Monarĥo“, mi diras fine al tiu, pri kiu mi konkludis, juĝante laŭ liaj botoj, ke li apartenas al la plej antikva reĝa gento, „laŭ mia scio ripozas nun ciaj trireĝaj ostoj en katedralo de Cöln am Rhein. Bela preĝejo — tute bela — tre bela —“

Alparolita reĝo faris per sia majesta buŝo ian tute strangan movon, kies signifon mi ne komprenis — ĝi havis mienon kiel se nenobela homo malfermas buŝegon.

„Kiu el vi“, mi daŭrigis denove, serĉante parolfadenon, „kiu el vi estas Kaŝ — pareto?“ — Por diri Kaŝparo la lango ne volis servi, tiu vorto ŝajnis al mi iom senrespekta.

„Hihihi!“ eksonis el reĝa grupo. — „Tiu estas Kaŝparo!“, Ipuŝis unu kaj tuŝis per fingro sian najbaron sub la skapolon. La pikita ektremis ĉar fingrotuŝo lin tiklis. Jen, Koubek estas prava, dirante, ke „la reĝoj estas tiklemaj!“

„Kaj kiu el vi estas la ‚nigra malantaŭe‘ —?“ sed apenaŭ mi tiujn vortojn eldiris, mia vizaĝo honte ruĝiĝis. Mi sentis, ke mi estas eldirinta ion ekstreme malĝentilan.

„Tiu ĉi estas la nigra malantaŭe“, eksonis voĉo el reĝa grupo. Mirigita mi levis okulojn.

„Kaj kiel ci estas nomata, ci, la tria?“ mi demandas poste.

„Josef Malina“.

Tiel! Mi metis manon sur la frunton — nova enigmo! Kiel konate, la sola inter evangeliistoj, sankta Mateo, rakontas al ni pri „saĝuloj“ alvenintaj de oriento.“ Li ne nomas ilin reĝoj kaj ne scias iliajn nomojn. „Sep cent jarojn pli malfrue“, mi legis ie, „konfirmis subite instruita teologo Beda, pastro el Northumberland, ke ili estis potentatoj kaj nomis sin per anglaj nomoj: Kaŝpar, Meliĥar, Baltazar. Pli poste saĝaj teologoj pruvadis, ke ili estis nomataj alie: „Apeles, Amarus, Damaskus — Astor, Sator,

peratoras — Magalaĥ, Galgalath, Satracen —“. Kaj jen venas tiuj ĉi potentatoj mem kaj unu el ili atestas, ke li nomas sin Josef Malina.

Mi alpaŝis pli proksimen por ĵuri respekton al ili. Reĝo Malina havis ĉemizon kun forŝirita kolumo kaj sur nudigita kolo mi ekvidis sangan strion, kvazaŭ iu estus lin gratinta per ungo, eble nur antaŭ kelke da minutoj.

„Monarĥo, ci interbatiĝis ie!“ mi diras respekteme.

„Tion ĉi faris al mi jen Kristl!“ plendis monarĥo kontraŭ monarĥo apuda. En tiu momento venis al mi ideo vere diabla — ni demokratoj valoras tamen nenion! Ho, mi pensas, dissemu inter ili semon de malpaco! Donu al reĝoj sumon, kiun oni ne povas dividi per tri!

Mi trempis manon en mian poŝon kaj elprenis kvin krejcerojn. „Jen por aĉeti paketon da trireĝa tabako,“ mi diras. — „Hihihi“! ridegis la potentatoj. Ankoraŭ mi petis, ke ili iru laŭ alia direkto en sian patrujon, ke ili ne revenu plu al reĝo Herodoto kaj ne perfidu al li, kie ili min trovis. Kaj mi fermis post ili.

Post momento eksonis terura kriego ekstere kaj mi saltis al pordo. Malferminte, mi aŭdis, ke du reĝoj rapidas malsupren; la tria sidis sur la tero kaj ĝemploris. Ĝi estis reĝo Kristl. „Stěchovský vangofrapis min!“ li ĝemis kompatinde. Do Stěchovský, Malina, Krystl! — Š + M + K + —

# VAMPIRO.

El „Arabesky“ de Jan Neruda.

Ekskursa vaporŝipo alveturigis nin el Konstantinoplo al bordo de insulo Prinkipo kaj ni eliris. La societo ne estis granda. Unu pola familio, patro, patrino, filino kaj ŝia fianĉo, poste ni du. Jes, por ne forgesi, estas al ni aliĝinta ankaŭ iu Greko, juna homo, sur la ligna ponto kondukanta trans Ora Korno; pentristo verŝajne, juĝante laŭ skizaro, kiun li havis sub la brako. Longaj, nigraj bukloj faladis sur liajn ŝultrojn, la vizaĝo estis pala, nigra okulo profunden en la kaveton enfalinta. En la unua momento li interesis min, precipe pro sia servemo kaj sia konado de lokaj aferoj. Sed li parolis tro multe kaj mi forturnis min poste de li. Tiom pli agrabla estis la pola familio. La patro kaj la patrino sinceraj, bonaj homoj, la fianĉo eleganta juna viro kun manieroj rektaj kaj ĝentilaj. Ili veturis Prinkipon por pasigi tie la somerajn monatojn kun sia malsaneta filino. La bela paleta junulino estis aŭ jus grave malsaninta aŭ grava malsano nur nun en ŝi komenciĝis. Ŝi apogis sin je sia fianĉo, ofte eksidadis, kaj ofte ripetata seka

tuseto interrompadis ŝian murmureton. Post ĉiu ektuso haltigis ŝia akompananto indulgeme la paŝon. Li ekrigardis ŝin ĉiam kompateme kaj ŝi alterne lin, volante kvazaŭ diri: „Tio estas ja nenio — mi estas feliĉa!“ Ili kredis sanon kaj feliĉon.

Laŭ rekomendo de Greko, kiu foriris de ni tuj apud la digo, luis la familio loĝejon en hotelo sur altaĵo. La hotelmastro estis Franco kaj lia tuta domo estis aranĝita komforte kaj bele laŭ franca maniero.

Ni matenmanĝis kune kaj kiam la tagmeza varmego iom ĉesiĝis, ni ĉiuj ekiris sur la altaĵon en pinan arbareton por refreŝiĝi per la vidaĵo. Apenaŭ ni elserĉis oportunan lokon kaj nin dismetis, jen aperis refoje la Greko. Li salutis ne tro atente, ĉirkaŭrigardis kaj sidiĝis nur je kelkaj paŝoj de ni. Malferminte la skizaron li komencis desegni.

„Mi opinias, ke li sidiĝas intence tiel proksime de la roko, ke ni ne povu rigardi lian desegnaĵon,“ mi diras.

„Ni ne bezonas rigardi,“ opiniis la juna Polo ni sufiĉe vidas antaŭ ni.“ Kaj post momento li aldonis: „Ŝajnas al mi, ke li aldesegnas nin kiel scenfigurojn — estu!“

Ni havis vere sufiĉon por vidi. Ne ekzistas pli bela kaj pli feliĉa anguleto en la mondo ol tiu ĉi Prinkipo! Politika martirino Ireno, samtempulino de Karolo Granda, vivis ĉi tie unu monaton „ekzile“ — se mi povus pasigi ĉi tie unu monaton de mia vivo, la reston de vivo mi estus feliĉa per la rememoro. Jam pri tiu sola tie pasigita tago mi neniam forgesos.

La aero estis klara kiel diamanto, tiel mola, tiel agrabla, ke la tuta animo en ĝi forluliĝis. Dekstre trans la maro sin levis brunaj montoj aziaj, maldekstre en malproksimo bluiĝis kruta bordo eŭropa. Proksima Kalki, unu el naŭ insuloj de la „princa arĥipelago“ altiĝis kun siaj cipresaj arbaroj kiel malĝoja sonĝo en senvoĉan altecon, kronata per granda konstruaĵo — rifuĝejo de frenezuloj.

Akvo de Marmora estis nur iomete ŝaŭmigita kaj brilis ĉiukolore kiel radianta opalo. Malproksime estis la maro laktoblanka, poste rozkolora, inter ambaŭ insuloj kiel flama oranĝo kaj sub ni jam bele verdblua kiel diafana safiro. Ĝi estis sola kun sia beleco, nenie pli grandaj ŝipoj, nur du malgrandaj ŝipetoj kun anglaj flagoj vagis laŭlonge de la bordo; unu estis vaporŝipeto granda kiel gardista budo, la alia havis ĉikaŭe dekdu remistojn kaj kiam iliaj remiloj samtempe leviĝadis, degutis de ili fandita arĝento. Fidemaj delfenoj trakuradis inter ili kaj elflugadis en longaj arkoj super la akvan nivelon. Tra blua ĉielo sin portis post paŭzoj trankvilaj agloj mezurantaj interspacon inter ambaŭ mondpartoj. La tuta deklivo sub ni estis kovrita per florantaj rozoj, kies odoro saturis

aeron. De la kafejo apud la maro sonadis tra pura aero muziko, per distanco sufokita.

La impreso estis raviga. Ni ĉiuj eksilentis kaj ensorbis tutkore la paradizan pentraĵon. La juna Polino kuŝis sur herbo kaj havis la kapon apogita je brusto de amato. Pala ovaleto de ŝia delikata vizaĝo koloriĝis kaj el blua okulo elŝprucis subite larmoj. La fianĉo komprenis, li kliniĝis kaj forkisis larmon post larmo. Ankaŭ ŝia patrino eklarmis — kaj mi — mi sentis min iel premata . . .

„Ĉi tie devas animo eĉ korpo resaniĝi" murmuretis la junulino. „Kiel feliĉa estas tiu ĉi regiono!"

„Dio atestu — mi ne havas malamikojn, sed, se mi havus ilin, tie ĉi mi ilin pardonus," diris patro per tremanta voĉo

Kaj denove ĉiuj eksilentis. Ĉiuj sentis sin tiel bele, tiel nedirible dolĉe! Ĉiu sentis en si tutan mondon da feliĉo kaj ĉiu estus dividinta sian feliĉon kun la tuta mondo. La sento estis sama en ĉiuj, tial unu ne interrompis alian. Mi eĉ ne rimarkis tion, ke la Greko post kelka tempo leviĝis, fermis la skizaron kaj salutinte refoje ne tro atente, foriris. Ni restis.

Fine, post kelkaj horoj, kiam la malproksimaĵo jam kovriĝis per pli malhela viola koloro, sude tiel sorĉe bela, admonis la patrino foriri. Ni leviĝis kaj marŝis malsupren al hotelo per nerapida, elasta paŝo de senzorgaj infanoj.

Ni sidiĝis en la hotelo sub bela verando.

Apenaŭ sidiĝinte ni aŭdas sub verando disputon kaj insultojn. Nia Greko disputas tie kun hotelisto kaj ni pro amuzo aŭskultas.

La amuzo ne daŭris longe. „Se mi ne havus ĉi tie ceterajn gastojn" — ekmurmuris hotelmastro kaj supreniris la ŝtuparon al ni.

„Mi petas vin, sinjoro," demandas la juna Polo alpaŝantan. „kiu estas tiu sinjoro kaj kiel li estas nomata?"

„Eh, kiu scias, kiel tiu homo estas nomata," murmuris la hotelisto, kaj rigardis venene malsupren, „ni nomas lin Vampiro."

„Pentristo?"

„Fimetio! Li desegnas sole kadavrojn! Tuj kiam iu en Konstantinoplo aŭ ĉi tie en ĉirkaŭaĵo mortas, jam la saman tagon li havas pretan portreton de la malvivulo. Tiu fripono pentras jam antaŭe — kaj neniam eraras, kiel vulturo!"

La maljuna Polino ekkriis terurite — en ŝiaj manoj kuŝis la filino, krete pala, sveninta.

Kaj tuj desaltis la fianĉo de ŝtuparo, kaptis per unu mano la Grekon je la brusto, kaj la alian streĉis kontraŭ la skizaro.

Ni dekuris rapide post li. Ambaŭ viroj interbaraktis jam en sablo.

La skizaro estis disĵetita kaj sur unu folio — per krajono desegnita kapo de la juna Polino — okuloj fermitaj, ĉirkaŭ la frunto mirto. —

## UNUA LEGOLIBRO.

Sub tiu ĉi titolo aperis antaŭ kelkaj tagoj nova libro, verkita de tre konata aŭtoro Dr. Kabe (Dr. Bein) el Warszawa, kies facila kaj modela stilo gajnis jam tiom da legantoj al ĉiuj liaj verkoj: La fundo de l' mizero. La interrompita kanto. Pola Antologio. Internacia krestomatio. La Faraono. Ni opinias, ke plaĉos ankaŭ al niaj legantoj, kiuj ankoraŭ ne posedas iun el nomitaj libroj, legi kelkajn liniojn el aŭtoro tiel ŝatata, kaj ke niaj montrajoj estos gvidilo ankaŭ por bibliotekistoj de kluboj, kiam ili elektos novajn verkojn.

G a r d a d o d e l i b r o j. En la bibliotekoj de kelkaj amerikaj urboj (Milwaukee, Cleveland k. a.) oni publikigis malpermeson difekti la librojn en formo de fabelo por infanoj. La folio, sur kiu estas presita la fabelo, servas kiel signeto por la libroj. La rimedo donis bonajn rezultatojn; jen estas la enhavo de la fabelo:

·Foje oni aŭdis interparoladon de biblioteka libro kun knabo, kiu ĝin pruntis.

„Mi vin petas,“ diris la libro, „ne tuŝu min per malpuraj manoj. Mi poste hontus montri min al la knaboj, kiuj dezirus min preni.

Ne lasu min nekovrita sub la pluvo. La libroj, same kiel la infanoj, malvarmumas.

Legante ne apogu sur mi viajn kubutojn; ĉi tio doloras! ...

Malferminte min, ne kuŝigu mian vizaĝon sur la tablo. Vi ja ne volus, ke oni faru la samon al vi?

Ne enmetu inter miajn foliojn krajonon aŭ ion alian pli dikan ol la papero, alie vi malbonigos mian dorson.

Kiam vi interrompas la legadon, ne faldu miajn randojn por signi, kie vi haltis, sed enigu malgrandan puran signeton, poste fermu min kaj kuŝigu, por ke mi povu oportune ripozi.

Memoru, ke post vi mi devas viziti tiom da aliaj knabetoj; ankaŭ vi mem eble ree min renkontos: „vi ne estus kontenta, se vi trovus min malnova, difektita, makulita. Zorgu pri mia freŝeco kaj pureco kaj mi helpos vin esti feliĉa.“

K o n f e s o: Ĉu vi ĉion konfesis? — diris respektinda pastro al pekulo dum la konfesado.

Ne, ankoraŭ unu peko ŝarĝas mian konsciencon: mi ŝtelis poŝhorloĝon, ĉu vi akceptos ĝin?

Mi? — diris la ofendita pastro. — Vi kuraĝas ofendi min kaj mian sanktan profesion? Redonu senprokraste la horloĝon al tiu, de kiu vi ŝtelis.

Mi jam provis redoni, sed li ne volas ĝin akcepti; mi petegas vin, prenu ĝin.

Ĉesu ofendi min, — diris la pastro — vi devis ripeti vian peton.

Mi faris tion — respondis ŝtelisto — sed li ne volas akcepti.

En tia okazò — diris la sankta, nenion suspektanta pastro, — mi povas senpekigi vin, sed mi insiste ordonas al vi ne ŝteli plu.

Baldaŭ post la foriro de la konfesinto, la pastro rimarkis ke lia propra poŝhorloĝo estis ŝtelita de la hoko, sur kiu li ordinare pendigis ĝin.

Anekdotoj. Iu skribis al sia amiko: „Mi sendas al vi surtuton kaj vi trovos ĉi tiun leteron en ĝia maldekstra poŝo." — Vojmontrilo havis sekvantan surskribon: „Ĉi tiu vojeto kondukas al B., sed kiu ne scias legi, iru sur la granda vojo." — Malsaĝulo renkontis sian kolegon kaj diris: „Vi ja mortis, kiel mi aŭdis". Kaj kiam ĉi tiu respondis: „Sed vi vidas, ke mi vivas," la unua rediris: „Tiu, kiu diris al mi tion, estas pli kredinda homo, ol vi." — Soldato ekdormis sur la posteno, sed lia kamarado honeste plenumis sian devon. Subite kanona kuglo forportas la kapon de l' dormanto. „Mil diabloj!" ekkriis la gardestaranto, „kiel li ekmiros, kiam li vekiĝos sen kapo." — Du homoj renkontis unu alian sur mallarĝa vojeto, kaj neniu volis cedi al la alia. Kolere diris unu: „Mi neniam cedas sur la vojo al la malsaĝulo!" „Mi tre volonte," respondis la alia, iris flanken kaj faris ĝentilan saluton. — En societo oni parolis pri la fama Cook, kiu tri fojojn faris vojaĝon ĉirkaŭ la tero kaj estis mortigita sur la insulo Ovaihi. Iu esprimis sian bedaŭron kaj demandis: „Ĉu sinjoro Cook perdis la vivon dum sia dua aŭ tria vojaĝo?"

Granda kapo de brasiko. Du metiaj knaboj, Petro kaj Benedikto pasis foje preter legoma ĝardeno.

Rigardu, diris Petro, kiel grandaj brasikaj kapoj!

Tute ne grandaj, respondis Benedikto, granda fanfarono. Dum mia migrado mi vidis foje brasikan kapon, kiu estis kvarfoje pli granda, ol la paroĥa domo.

Petro, kiu estis kupristo, diris: Granda estis via brasika kapo. Sed mi foje faris kaldronon, kiu estis tiel granda, kiel la preĝejo.

Pro Dio, ekkriis Benedikto, por kio oni bezonis tiel grandan kaldronon?

Kredeble, respondis Petro, por kuiri en ĝi vian brasikan kapon.

1907. Příloha „ČASOPISU ČESKÝCH ESPERANTISTŮ". I.

Jest málo problémů, jichž řešením by se lidstvo tak horlivě zabývalo, jako byla v posledních třech stoletích otázka pomocného jazyka mezinárodního Již náš Komenský tlumočil ideji tu ve svém spise Via Lucis (XIX. 9.) slovy: „Míníme, že jeden jazyk obecný světu jest potřeben, a kdyby jiného nebylo, že by náleželo spíše latinu k té potřebě ustanoviti, než-li sic který jiný. Ale že myšlénky naše nyní výše jdou, nemůžeme si pomoci, abychom raději k naprosto novému neradili jazyku". Největší myslitelé uznávají, že myšlénka pomocného jazyka, vyplynuvší z praktické potřeby, plně jest uskutečnitelna. Mocným rozvojem dopravnictví nabyly naše styky obchodní, průmyslové a vědecké nové půdy, neboť civilisovaným světem, který do té doby omezoval se na starou Evropu, rozumí se dnes téměř všechny země, všechny národy. Tím poslouženo sice vzájemnému jich sblížení, avšak různost jazyků zamezuje, abychom mohli všechny výhody z toho plynoucí uplatniti. Proto jest třeba jednoho pomocného, společného jazyka, který by svou snadností a při tom i jednoduchostí a přesností stal se tím, čím dnes jest nám několik t. zv. jazyků světových: angličina, frančina, němčina atd.

Úlohu tu nemůže žádný z jazyků živých zastávati, čemuž překáží jednak jich nesnadnost (gramatika, výslovnost), hlavně pak nevraživost národů ostatních, kteří by ztráceli svůj význam hospodářský. Jazyky mrtvé, neposkytujíce dostatečného bohatství slovníkového a jsouce krom toho nepoměrně těžkými, nemohou býti za pomocné ani navrženy. (Bližší viz v brožuře dr. L Couturat: „O jazyce mezinárodním". Přel. J. F. Khun. Cena 20 h.) Zbývá jediné možné řešení — přijetí jazyka umělého, jímž jest Esperanto.

Bohužel, zakořenil se u nás následkem úpadku Volapüku mylný předsudek, že nějaký jazyk mezinárodní vůbec jest pouze krásným snem; ve skutečnosti ale stal se Volapük nemožným pouze proto, že hned jeho základy byly zcela pochybené. Jisto jest, že nebýti jeho, bylo by Esperanto dnes všude známo a při mezinárodních stycích stále užíváno. A příčina zániku Volapüku? Přílišná složitost, hlavně co slovníku se týče, nelibozvučnost a potřeba dlouhého studia k zapamatování si nevyslovitelných tvarů. Kromě těchto nedostatků hlavním byl ten, že Schleyer (autor) mínil Volapükem propagovati illusorní myšlénku universální řeči, jediné na světě.

Kdyby Esperanto, které má sloužiti pouze v případech, kdy znalost cizího jazyka nestačí, nebylo nepoměrně lehčí a dokonalejší Volapüku, zajisté nikdo by se dnes neodvážil jmenovat je správným rozluštěním zmíněného problému.

Autorem Esperanta jest varšavský lékař dr. Zamenhof, který uveřejnil o něm první spis r. 1887. pod pseudonymem dr. Esperanto (t. j. dr. Doufající), a odtud též pochází jméno, které tento jazyk nyní má. Hlavní předností Esperanta jest jeho jednoduchá mluvnice rázu germánského, obsahující pouze několik pravidel, fonetický pravopis, (t. j. píše se jak se slyší) a slovník v pravdě mezinárodní, který obsahuje kořeny převzaté po většině z jazyků románských, neboť $^{2}/_{3}$ slov mezinárodních dodala jazykům latina. Povaha skladby Esperanta jest slovanská. Jest patrno, že sloučeny tu jsou velmi důmyslně hlavní jazykové složky, totiž mluvnice, slovník a skladba, ze tří prvních nářečí evropských a tím docížena úplná neutrálnost Esperanta, na němž nelpí známka libovůle.

Přehled: Srozumitelnost i osvojení si Esperanta neobyčejně usnadňují jeho znaky gramatické, dle nichž na prvý pohled neb poslech rozeznati lze jméno podstatné od přídavného nebo příslovce a pod.

**-o** jest koncovka jména podstatného: patro = otec; amiko = přítel; vero = pravda.

**-a** jméno přídavné: amika = přátelský; vera = pravdivý; longa = dlouhý.

**-e** příslovce: vere = v pravdě, opravdu; longe = dlouho, dlouze; rapide = rychle.

**-j** značí množné číslo: junaj homoj = mladí lidé; bonaj ekzemploj = dobré příklady.

**-n** zn. 4. pád: fraton = bratra; bonan filon = dobrého syna; multajn adresojn = mnohé adresy

**-as** zn. čas přítomný: mi vidas = (já) vidím; vi kuras = běžíte; ŝi estas = ona jest.

**-is** zn. čas minulý: mi vidis = viděl jsem; ili laboris = (oni) pracovali.

**-os** zn. čas budoucí: mi vidos = uvidím; ili kantos = budou zpívati.

**-us** zn. způsob podmiňovací: mi vidus = viděl bych; li legus = (on) četl by.

**-u** zn. způsob rozkazovací: vidu! = viz! vizte! ni laboru! = pracujme!

**-i** zn. způsob neurčitý: vidi = viděti; paŝti = pásti; esperi = doufati; skribi = psáti.

**-ant** zn. přechodník přítomný: esperante = doufaje, -íc, -íce, portante = nesa, -ouc, -ouce.

**-int** zn. přechodník minulý: portinte = nes, -ši, -še; veninte = přišed, -ši, -še.

**-ont** zn. přechodník budoucí: estonte = buda, budouc, budouce; falonte = padna. (pluganta = orající; veninta = přišedší; venonta = příští; leganto = čtenář; eltrovinto = vynálezce; savonto = spasitel).

**-at** zn. příčestí trpné času přítomného: skribata = psán.

**-it** zn. příčestí trpné času minulého: skribita = napsán

**-ot** zn. příčestí trpné času budoucího: pagota = splatný.

Pravidla tato jsou bez výjimek. Rodu gramatického není; člen určitý: la. Přízvuk jest vždy na předposlední slabice.

Slovník obsahuje pouze kmeny základní (as 1000) jako: adreso, tragedio, alkoholo, domo, literaturo, poŝto (ŝ = š), kolego, parto, kruco, oleo, muta, proksima, papero, gazeto, nazo, bone, mezuri, urbo, maniero, ĉevalo (ĉ = č), lumo, vintro, a t. d.

Slova tato jsou buď úplně mezinárodní nebo společná alespoň několika řečem; z nich možno pouhým sestavováním tvořiti slova nová: skribmaŝino, paperfolio, vaporŝipo, internacia, stacidomo, a j.

Neuvěřitelné bohatství slovníku spočívá však hlavně v systemu as 30 předpon a přípon, které, majíce vlastní, ustálený význam, činí pamatování si odvozených slov nanejvýš snadným. Na př. přípona **-an** značí (jako v češtině) obyvatele, stoupence, člena: urbo, urbano = město, měšťan; kristano = křesťan; **-ist** značí osobu zabývající se tím, co kmen slova vyjadřuje: maŝinisto = strojník; artisto = umělec; **-il** vyznačuje jména nástrojů: plugilo = pluh; kalkulilo = počítadlo; **-in** značí pohlaví ženské: fratino = sestra; kokino = slepice; předpona **dis-** značí české roz- ve smyslu rozděliti: disrompi = rozlomiti; disdoni = rozdati a t. d.

Zvláště se však vyznamenává Esperanto tím, že může mu býti ihned porozuměno a to pomocí slovníku, aniž by bylo třeba i jen čísti nebo znáti něco z jeho mluvnice. Toto faktum, mající ohromnou důležitost v ohledu praktickém, nenalezneme v žádné jiné řeči.

La helpa lingva internacia Esperanto estas tre facila, simpla, fleksebla kaj belsona. Por paroli lingvon vivan oni bezonas jarojn, por paroli Esperanton — monatojn.

Esperanto získává stále nových stoupenců ve všech dílech světa a můžeme říci, že není dnes krajiny, kde bychom se nesetkali s Esperantisty. V první době jevil se největší zájem o Esperanto v Rusku Švédsku a Polsku; dnes stojí v čele celého hnutí Francie a Anglie, kde chopili se propagandy četní universitní profesoři, vysoké kruhy vojenské a obchodní. Dle zpráv Ústřední statistické kanceláře esperantské (sídlem v Paříži) bylo založeno do konce června 1907 na **650 spolků** propagačních, a to: ve Francii a v Anglii po 100. v Německu 50, v Americe 60, v Asii 15, v Africe 6, v Australii 6. Vedle těchto spolků existuje přes 200 konsulátů esperantských a řada společností dopisujících Esperantem. Netřeba podotýkati, že přečetné obchodní firmy, poznavše praktický jeho význam, vydávají esperantské cenníky a navazují nové styky i v zemích jim dříve nesnadno přístupných. Důkazem schopnosti Esperanta k ústnímu dorozumění jsou vedle ojedinělých náštěv cizinců světové kongresy, pořádané každý rok v jiné zemi. Prvního (v Boulogne sur Mer, Francie) súčastnilo se na 1000 Esperantistů; druhý pořádán byl v Ženevě, letošnímu v Cambridge (Anglie), bylo přítomno přes 1300 osob, příslušníků 30 různých národností a zemí. (Vláda belgická obeslala kongres oficielním zástupcem.) Pro rok 1908 zvoleny Drážďany. U příležitosti prvého ze jmenovaných sjezdů vyznamenala francouzská vláda autora Esperanta, dra. Zamenhofa, řádem čestné legie. — Městská rada londýnská a mnohé obchodní komory v Anglii zařadily Esperanto mezi zkušebné předměty; rovněž ve Francii vyučuje se mu na mnoha školách. Zvláštní kursy Esperanta jsou pořádány na školách vojenských; v Paříži samé bylo loňského roku zahájeno přes 80 kursů veřejných. V Ženevě jest sídlo Mezinárodní vědecké asociace esperantské, jejíž předsedou zvolen jeden z nejhorlivějších propagatorů Esperanta v Německu prof. Schmidt. ředitel magnetické observatoře v Postupími; ve výboru zasedají: gen. Sebert z Paříže, prof. J. J. Thomson, fysik z Cambridge, Dr. René de Saussure, prof. university ženevské, prof. Huntington ze sev. Ameriky, Dr. C. Bourlet, prof. z Paříže, Dr. Boirac, rektor dijonské university a Dr. R. Benoît, řed. mezinárodní kanceláře měr a vah v Paříži.

Esperanto není tudíž pouhým plánem v theorii, ale jest to jazyk hotový a v praktickém životě s prospěchem užívaný; to dokazují statisíce dopisů esperantských, vyměněných mezi všemi národnostmi světa, **na 50 odborných a propagačních časopisů a více než 1000 spisů původních i přeložených.** Sama akciová tiskárna esperantská v Paříži, založená v r. 1904, vydává každoročně (stejně jako mnohé jiné firmy nakladatelské: Hachette & Co. v Paříži, Möller & Borel v Berlíně, Review of Reviews v Londýně, American Esperanto Association v Bostonu atd.) řadu knih všech odborů; z nich jmenujeme na prvém místě: Hamleto, Julius Cezar, Ventego (Shakespeare). Monadologio (Leibnitz). Don Juan, Avarulo (Molière). Eneido (Virgil). Iliado (Homer). La fundo de l' mizero (Sieroševski). Kain, Ĉielo kaj tero (Byron). Faraono (Prus). Demono (Lermontov).

Paŭlo kaj Virginio (Bernardin de St. Pierre). Evangelio de st. Mateo (Luther). Interrompita kanto (E. Orzeszko). Pola antologio. Paĝoj el flandra literaturo. Internacia krestomatio (Dumas, Čechov, Gorkij, Kipling, Sienkiewicz, Sutnerová, Niemojewski). Wilhelm Tell (Schiller). Elektitaj fabeloj (Fratoj Grimm). Don Kihoto de Manĉujo (Cervantès). Blinda rozo (Conscience). Kristnaska sonorado (Dickens). Vojaĝo interne de mia ĉambro (X. de Maistre). Boris Godunov, Štona Gasto (Puškin) Revizoro (Gogol). Virineto de maro (Andersen). Rakontoj al mia belulino (J. Bach-Sisley). Elektitaj fabloj (Lafontaine). Gefratoj (Goethe). La puto kaj la pendolo (E. A. Poë). Edziĝo de Figaro (Beaumarchais). Du biletoj (Florian). Esther, Atali (Racine). Plutos (Aristophane). Fabloj (Ezop). Kverko kaj floro (de Amicis). La patro de pestuloj (Slowacki). Ruĝa rido (Andrejev); z původních: Kastelo de Prelongo. La Gasto. Majstro Jan Hus. Tra Mez-Afriko. Du rakontoj. Fundamenta Krestomatio. Raportoj pri esperantaj kongresoj. Tutmondaj fajrokutimoj. Bonegaj atestoj. Libro de l' Humoraĵo. Perdita kaj retrovita. Elementa fotografa optiko. Komercaj leteroj Pri novaj trigonometriaj sistemoj. Stenografio esperanta. Matematika terminaro. Rezisteco de ferkolonoj. Inter Blinduloj.

Netřeba jmenovati četné průvodce, hudebniny, literaturu pro slepce, jakož ani nová vydání učebnic a slovníků esperantských, přeložených do více než **30 řečí**. (Učebnici pro Čechy vydal Th. Čejka v Bystřici p. Host., Morava.)

Literatura periodická jest zastoupena **časopisy**: Internacia Scienca Revuo, Foto-Revuo, Espero Katolika, Int. Socia Revuo, Laboro, Espero Pacifista, Flugila stelo (stenogr.) Esperanta Ligilo (por blinduloj), Juna Esperantisto, La Revuo, Tra la Mondo, Esperanto-journal, Idealo, Lingvo Internacia, Časopis Českých Esperantistů, L'Espérantiste, Tra Parizo. Paris-Esperanto, The British Esperantist, Esperanta Instruisto, Germana Esperantisto, Das Echo. Afrika Esperantisto, Esperanta Abelo, Ruslanda Esperantisto, Pola Esperantisto, Esperantisten (sveda), Esperanto (hung.) Svisa Espero, Suno Hispana, Bulgara Esperantisto, Lumo (bulg.), Helpa Lingvo (dana), Pioniro (Hindujo), Brazila Revuo Esperantista, Antaŭen Esperantistoj (Peru), L'Amerika Esperantisto, The American Esperanto Journal, Centramerika Esperantisto, Verda stelo (Mexiko), Laboro, Amsterodama Pioniro, Filipina Esperantisto, Japana Esperantisto.

Bližší zprávy o Esperantu podají: Klub Esperantistů v Praze (I.-342), Dámský odbor v Praze „u Náprstků", Odbor Esperantistů v Proseku, Odbor Esperantistů v Plzni, Odbor Esperantistů v Č. Budějovicích, Klub Esperantistů v Kuklenách u Hradce Král., Klub Esperantistů v Králové Dvoře, Klub Českých Esperantistů v Brně, Kroužky Esperantistů v Jičíně, Táboře, Oseku u Rokycan, Tišnově, Prostějově.

**„Časopis Českých Esperantistů"**, oficiala monata organo de bohemaj Esperantistoj, přináší články o šíření se Esperanta v cizině (psané česky) i v našich zemích, belletrii (esp. práce pův. i překlady), bibliografii, přehledy ostatních časopisů esp., informační články o českém národě (esp.), adresy dopisovatelů atd. — Roční předpl. v adm. 3 K pro Rakousko, 3·75 Fr. pro cizinu. Adresa: „Redakcio & administracio de Časopis Českých Esperantistů en Praha".

---

(Redakce vyřídí též objednávky tohoto listu: cena 1 ex. 1 hal.)

# KRONIKA.

**FRANCIE.** Přes 100 francouzských klubů esperantských, dnes stávajících, zahájilo čilou propagační činnost již v prvních týdnech po našem třetím kongresu, který dal dosti látky ku přednáškám a článkům v časopisech. „Paris-Esperanto“ uveřejňuje seznam již otevřených 50 kursů v Paříži a ostatní esperantské časopisy přinášejí zprávy o kursech pořádaných ve všech větších městech. — Každoroční příspěvek 400 Fr. uděluje místnímu klubu esperantskému městská rada v Orléansu; obchodní komora v Blois, městské rady v Limoges a Armentières věnují ve prospěch propagandy po 100 Fr. ročně. Starosta města Calais přispívá k témuž účelu 200 Fr. ročně. — Berlitzova škola jazyků v Remeši a vyšší obchodní škola v Lyoně vyučují Esperantu. — Officielní vyučování zavedeno bylo ve školách v Lille, kdež učí se dnes Esperantu přes 1100 žáků. Připomínáme, že již po dva roky pořádají officielní kursy Esperanta škola Turgot v Paříži, Institution Dalayrae a Institution Silvestre v Fontenay-sous-Bois u Paříže. O výsledcích vyučování neopomeneme zpraviti své čtenáře. — „Centra Oficejo“ v Paříži sestavuje sbírku diapositivních snímků zachycených na kongresu v Cambridge, kterou bude půjčovati ku přednáškám. — Dosud vydávaný adresář (Hachette & Comp. Jarlibro Esperantista) nebude obsahovati v příštích ročnících adresy jednotlivých Esperantistů-členů klubů, nýbrž pouze seznam členů výborů a konsulů esperantských, hlavní data týkající se založení a sídla klubu, ročního příspěvku, officielního orgánu a pod. Kromě toho uveřejní reklamní oznámení firem, které zašlou text svých insertů do konce prosince s poplatkem 1 ctm. za každé slovo. — Časopisy: Le Correspondant International, La plume sténographique a L' Intransigeant otevřely své sloupce pravidelným zprávám o Esperantu. — Měsíční revue „La Revuo“ vypisuje v každém čísle zajímavé literární konkursy pro své čtenáře, jichž čítá již přes 2000. — Presa Esperantista Societo vydala etymologický slovník 9-jazyčný; kniha ta bude vítanou pomůckou pro začátečníky, kteří, znajíce několik jazyků, chtějí sledovati „střední cestu“, jíž bral se dr. Zamenhof při volbě slov pro slovník kořenů Esperanta.

**NĚMECKO.** Po dohodě klubů sdružených v Germana Esperantista Asocio a ústředního organisačního výboru byly zvoleny Drážďany za sídlo IV. kongresu, který bude se konati od 16. do 22. srpna 1908. Kancelář přípravného výboru, v němž zasedají: Dr. Mybs, Dr. Schramm, pí. Hankelová a p. Arnhold, jest do konce června v Altoně (Marktstrasse, 68). S kongresem bude spojena opět výstava a výlety. Esperantské letní sídlo pro delší pobyt účastníků jest zřizováno v blízkém předměstí drážďanském péčí

výboru ubytovacího a Spolku ku povznesení návštěvy cizinců. Klub drážďanský pořádal již řadu kursů a přednášek o Esperantu, jimiž získal hlavně mezi obchodníky zájem o kongres. Počet došlých přihlášek přestoupil již 300. — Významného úspěchu dosáhlo Esperanto na 16. kongresu pacifistů, pořádaném dne 14. října t. r. v Mnichově. Byly přijaty návrhy G. Mocha, známého propagatora Esperanta a pacifismu, aby kongres tento doporučil užívání Esperanta (dosud dopisuje jím 35 společností mírových) ve stycích pacifistů a uložil mezinárodní kanceláři v Bernu zasaditi se u jednotlivých vlád o zavedení Esperanta do škol. Rovněž přijato bylo Esperanto vedle jiných řečí za jazyk jednací na příštím kongresu mírovém (Stockholm). — O kongresu pořádaném v Cambridge zaslala redakce „Germana Esperantisto" na 250 oznámení různým německým časopisům; mnohé z nich zprávy ty uveřejnily. Poslední číslo G. E. přináší seznam propagatorů naší myšlénky, kteří jsou ochotni, uspořádati ve svém okolí přednášky. — Klub Esperantistů ve Frankfurtu a Bad-Nauheimu uspořádal u příležitosti návštěvy dr. Zamenhofa slavnostní schůzi. — Pravidelně přinášely články o Esperantu časopisy „Das Echo", „Der praktische Wegweiser" a „Deutschlands Jugend". — Ve mnohých městech vyučuje se mu nejen v klubech, ale i v odborných spolcích a školách (obchodní akademie v Kolíně n. R., kurs pro universitní posluchače v Lipsku). Dosud vydalo deset různých autorů učebnice Esperanta pro Němce.

**ANGLIE.** Na zpáteční cestě z Cambridge byl dr. Zamenhof v Londýně přijat náměstkem ministra vnitra a členy parlamentu. — Pokladní zpráva třetího kongresu vykazuje přebytek 7200 kor., který byl rozdělen mezi Centra Oficejo, Brita Esp. Asocio a pokladnu fondu kongresního. — V Cambridge přistoupilo na 50 nových členů ku stávajícímu klubu; nový klub posluchačů universitních založil prof. Mayor; týž doporučil oběžníkem všem školám anglickým vyučování Esperantu, které jest klíčem k naučení se jiným cizím jazykům. — Přes 1000 zpráv o kongresu přinesly časopisy anglické. — V osmi časopisech vede rubriku esperantskou dr. O' Connor, předseda Irish Esperanto Association. — V Londýně pořádá se současně 40 kursů, z nichž deset na školách obchodních. — Pod názvem „Esperanto School & Office" byla založena škola a knihovna v Liverpoolu (7. Berry Street). — Prof. Christen v Edinburgu přednášel o Esperantu před tisícem posluchačů; přes 200 osob přihlásilo se do kursu. Dle výkazu uveřejněného v „The British Esperantist" bylo konáno v Anglii od 2. srpna do 22. listopadu 77 přednášek. — V nejnovějším anglickém lexikonu čteme pod heslem Esperanto velmi podrobný informační článek. — Světoznámá železářská firma „Consett Iron Compagny,

Limited" vydala esperantský cenník. — Nový časopis počal vycházeti v Londýně: „The Esperanto Instructor". Souběžné texty, anglický a esperantský, doporučují jej začátečníkům, kteří učí se některému z těchto jazyků. — Městská rada v Blackpoolu vydala Esperantem průvodce po městě. — Do konce listopadu bylo založeno v Anglii a osadách přes 100 spolků propagačních, z nichž nejposlednější v městech: Longhborough, St. Neots, Bournemouth, London N., Oakworth, Dublin, Stepney, Melbourne (Australie), Pretoria (J. Afrika), Soham, Cambridge, W Hartlepool, Selly Oak Birmingham, Fylde Blackpool, Leek, Shanklin, St. Helens, Abergavenny, Wrexham, High Wycombe, Halifax, Middlesbrough, Hawick, Stockton. Epworth a Norwich.

**BELGIE.** Mezi předními průkopníky naší myšlénky musíme jmenovati leut. Cardinala, officielního zástupce vlády na III. kongresu esp. v Cambridge. Týž pořádá v Belgii s plukovníkem Lemairem řadu přednášek, po většině jménem rad městských, které Esperanto velmi příznivě posuzují a podporují: tak na příklad udělila městská rada v Antverpách místním spolkům 500 Fr. ve prospěch propagace Esperanta. — Povinně vyučuje se Esperantu na škole pro učitelky v Looz-la-Ville. — Kurs university v Bruselu čítá 140 posluchačů. — Na okresní výstavě v St. Trond byl určen pro oddělení esperantské zvláštní pavillon. Ve mnohých časopisech objevila se zpráva, že kruhy vojenské zabývají se otázkou zavésti vyučování Esperanta do škol vojenských.

**RUSKO.** Spolek lékařů v Kazani, kde jest pořádán kurs Esperanta na universitě, usnesl se doporučiti všem ruským lékařům osvojení si Esperanta. Stejně vyslovil se kongres ruských lékařů pořádaný v Moskvě 2. května t. r. — „Ruslanda Esperantisto" přináší v posledních číslech zajímavé články o „Historii Esperanta v Rusku". — V Petrohradě byla otevřena stálá informační kancelář a museum Esperanta, vedené známým propagatorem Radvanem-Ripinskim (Adr.: str. Zarotnaja, loĝ. 31.). — Do kursů zahájených v Revalu přihlásilo se 400 účastníků. — Na akademii pro vojenské lékaře v Petrohradě byl založen klub „Esperido".

## KRONIKO NACIA.

**Praha.** La 9-an decembron festis Esperantista Klubo en Praha la kvinjaran jubileon de sia fondiĝo. Ĝia laboro, dediĉita al propagando de nia ideo, sukcesis starigi ĝin en vicon de plej gravaj societoj esperantistaj; malgraŭ nefavoro de ĵurnaloj, precipe en la komenco, la klubo gajnis intereson por Esperanto en gravaj korporacioj; ni citas la komitaton de bohema sekcio de aŭstria ekspozicio en London, kiu rekompencis ĝin per honora

diplomo por helpo en laboroj propagandaj. Per aranĝado de paroladoj, kursoj kaj regulaj semajnaj kunvenoj, dum kiuj oni uzis ankaŭ praktike Esperanton, kaj per riĉigado de biblioteko, enhavanta jam preskaŭ 300 verkojn (15 gazetojn), zorgis la komitato, ke la membroj havu sufiĉe da okazo perfektiĝi en Esperanto. Por siaj membroj, loĝantaj ekster Praha, ĝi fondis „rondirantan legejon“ de 10 gazetoj. La klubo atentis ankaŭ la boheman kamparon, kie ĝi fondis grupojn: (la unuan virinan grupon en Praha), en Plzeň, Prosek kaj Č. Budějovice. Ĉi tiuj societoj, havante jam rimarkindan nombron da membroj, fariĝas gravaj faktoroj en plua propaganda laboro. — Komitato de klubo estis elektita en eksterordinara ĝenerala kunveno la 20. XI. jene: prezidanto s-o G. Ctibor, membroj s-oj: J. Hradil, O. Davídek, V. Čánský, B. Kamenář, F. Kühnl, C. Nebuška, E. Kühnl. **Adreso de klubo**: s-o O. Davídek, sekretario Praha I. 342.

Al sia eksprezidanto s-o ing. Hofmann esprimas la klubo estiman dankon por lia tutjara zorgemo kaj laboro, kiujn li oferis al ĝi. Tre prave diris s-o Ctibor dum sia prezidado, respondinte je liaj vortoj: Nenion mi dezirus pli multe ol gajni tian amon de ĉiuj membroj, kian ĝuas hodiaŭ nia s-o eksprezidanto.

Kursoj en Praha estas aranĝataj de klubo, en societo „Moravská Beseda“ kaj en komerca societo Českoslov. Obchod. Beseda. — Unua virina grupo de Esperantista Klubo en Praha sciigas pri dolora perdo de sia fondintino, la plej granda amikino de nia ideo

La 13-an septembron mortis en Praha sinjorino Josefa Náprstková, animo de domo de Náprstek. Ĉiuj bohemaj virinoj estis per ŝia foriro en eternecon kore tuŝitaj. Ŝi estis vera modelo de noblanima virino, modesta, sed senlaca laborantino por ĉiu virina progreso. Mem Esperanto perdas en ŝi fervoran favorantinon kaj la virina esperantista grupo ŝatindan membron. Rememoro je ŝi estos por ni sankta.

Nia redakcio, konante la meritojn de la nobla virino, ŝian viglan laboron en bohemaj societoj kaj ŝian penadon dediĉitan al ĉiu progreso, tre bedaŭras foriron de animo tiel aminda, neforgesota.

La virina grupo organizis la 28-an decembron paroladon de s-o J. Krumpholc pri „Internaciaj kongresoj kaj Esperanto“. — Kelkaj gazetoj bohemaj notis, ke s-o Kamaryt salutis en malferma kunsido de Kongreso de „Libera Penso“ en Praha la ĉeestintojn per Esperanto.

En ceteraj urboj bohemujaj kaj moraviaj okazis ankaŭ multenombraj paroladoj ka kursoj: En **Plzeň** (s-o Balik) finiĝis kurso antaŭ kristnasko per bela vespera amuza kunveno; en

**Rokycany** paroladis s-o Em. Batěk el **Osek** apud Rokycany, kie li organizis kurson. En **Č. Budějovice** daŭras vigla propagando per artikoloj de s-o Svačina, kiu instruas publike kaj en la industria knabina lernejo. Kurson por studentoj kondukas s-o K. Šafář. Sukcesa laboro de Esperantista klubo en **Kukleny** montriĝas en fervoro de kursanoj, kiujn instruas s-o ing. Polák. En **Benešov** apud Praha malfermis kurson s-o Vejmelka; en **Jičín** s-o J. F. Khun, kiu esperas, ke li povos fondi societon. La 6-an XII. li faris sukcesan paroladon en ĉambrego de urba domo. Grupo estas fondata en **Tábor**. (Sin turni al s-o R. E. Cikhart. 103.) Societo esperantista en **Král. Dvůr** malfermis kurson tre multenombre vizitatan. En ĉirkaŭaĵo estas farataj paroladoj de s-oj Pettera, Zlatník, kaj Krajíček. La societo preparas ekspozicion de dokumentoj pri disvastiĝo de Esperanto. Niaj moraviaj amikoj en la bohema klubo esperantista en **Brno**, kie instruas s-o Dom. Konečný, ŝanĝis nun la klubejon: nova adreso de la kunvenejo estas: Restoracio „u Jonáků", Rudolfova tř. Brno, Moravio. La 15-an decembron aranĝis la klubo amikan kunvenon, la unuan en sia nova sidejo. En **Prostějov** estas fondatata societo; prof. Fridrich, kiu instruas en gimnazio, zorgis kun kelkaj samideanoj pri ekspozicio. Publikan paroladon en Prostějov faris la 6-an oktobron s-o J. Krumpholc. Prof. Fridrich parolis la 14-an novembron en **Olomouc**, kie laboras prof. Fierlinger per kurso pri stariĝo de nova societo. En **Tišnov** instruas s-o Teplý. Du kursoj estas malfermitaj de s-oj Kolkop, profesoro, kaj Grňa, instruisto en **Jevíčko**.

**Gazetaro:** Lastaj kvar monatoj, dum kiuj ni ne povis noti tiun ĉi rubrikon, alportis al nia afero multajn tre gravajn artikolojn en niaj ĵurnaloj; oni legis precipe pri la kongreso, kiu, kompreneble, ĉiujare pli multe devigados la gazetojn paroli pri la fakto, ke Esperanto vivas kaj kreskas. Favorajn raportojn, verkitajn de s-o V. Riegel, enhavis: „Národní Politika" (13., 28. VIII.), „Hlas Národa" (27. VIII.), „Čas" (31. VIII.), „Pražský Ill. Kurýr" (2. IX.) kun ilustraĵoj kaj „Světozor" (n-o 46). — Nelacigebla en sia laboro estas s-o Fr. Svačina, kiu regule publikigas en sudbohemaj gazetoj longajn propagandajn artikolojn, tre bone elektatajn: „Jihočeské Listy" (Č. Budějovice, 31. VIII.): Sjezd Esperantistů v Cambridge. Fr. Sv (10. VIII.): Esperanto na postupu. Dle Č. Č. E. od Fr. Sv. (23. X.): Úspěchy Esperanta. Otisk 1. příl Č. Č. E. Fr. Sv. (12. X.): Island. Esperantsky napsal Th Thorsteinsson z Rejkjaviku. Přel. Fr. Sv. (2, 6. XI.): Ostrov Capri. Z esperantského zápisníku turisty sdílí Fr. Sv. (9. XI.): Esperanto ve službách lékařů. El pola gazeto „Glos lekarzy," kiu presigis polan kaj esperantan alvokon al kuracistoj de tuta mondo, tradukis Fr. Sv. (20., 23. XI.) Mezinárodní jazyky. Fr. Sv. — „Budivoj" (Č. Budějovice, 2. VIII.): Bude někdy mezinárodní jazyk zaveden? Dle dr. Zamenhofa podává Fr. Sv. (22 X.): Esperanto a paedagogika. Napsal prof. dr. Ch. Bourlet v Paříži. Sděluje Fr. Sv. — „Mladoboleslavské Listy" (8., 13. VIII.): Dějiny

Esperanta v letech 1887–1907. H. K. B. — „Čas“ (24. X.): I. mezinárodní schůze učitelů. Artikolo de s-o J. Krumpholc, publikigita ankaŭ en kelkaj instruistaj revuoj bohemaj. — „Prázdniny“ (Brno, 1. XI.): Periodická literatura pomocného jazyka mezinárodního „Esperanto“ (s ill.). — „Národní Politika“ (18. VIII.): Belgická vláda a Esperanto. — „Naše Hlasy“ (Č. Brod 26. X., 1. XI.): Esperanto. Otisk 1. příl. Č. Č. E. — „Mládí“ (Praha, 1. XI.): Esperanto. J. Krumpholc. La artikoleto bone lokita en la unua numero de tiu ĉi nova gazeto por infanoj allogos certe per sia bone stilita enhavo intereson de kelke da junaj legantoj. Alia gazeto por bohema infanaro, eliranta en Silezio — „České Mládeži“ (Kochanovice, jaro III. n-o 3.) — malfermis en lasta numero esperantan rubrikon, redaktatan de s-o Fr. Svačina, instruisto en Č. Budějovice. — Samtempe aperis nova rubriko en gazeto „Mládenec“ (Praha, č. 13), skribita de Vilém R. Z. — Notojn pri la kongreso enhavis ankaŭ: Ozvěna z Novoměstska, Baťkovy „Illustrované Přednášky“, „Student“ (n-o 4), kaj „Lidové Noviny“ (Brno, 18. IX.). „Národní Listy“ ricevis kelkajn favorajn artikolojn pri la kongreso; malgraŭ tio ĝi publikigis la 25. VIII. felietonon de K. M. B., kiu, malbone informita, volas ludi rolon de informisto! Li konstatas la fakton, ke okazas kongreso, ke Esperanto ne estas lingvo malfacila, sed tamen li nomas ĝin „brila fantasmagorio“ kaj juĝas tion peko, se oni rezervus en la lernejo unu horon al instruado de artefarita lingvo. Por li estas Esperanto ludaĵo kaj ne estas mirinde, ke grandaj mondaj akademioj eĉ ne respondis al junaj fervoruloj, kiam ĉi tiuj postulis de ili proklamon de Esperanto kiel lingvo tutmonda.“ Ĉu s-o K. M. B. vidis verketon Majstro Jan Hus, el kiu li ĉerpis? Verŝajne nur unuokule, ĉar li eĉ ne sukcesis kopii nomon de ĝia aŭtoro! — La sama gazeto „surprizis“ siajn legantojn ankoraŭ unufoje per la vorto Esperanto; la 12. IX. ĝi parolas en artikolo „Příživníci Esperanta“ pri parazita kunvivado de „homaranistoj“ en la korpo de Esperantismo. Ni dubas, ĉu la afero estas tiel grava, ke ĝi naskigu malamon inter ambaŭ, kiel juĝas la verkinto de tiu felietona kolono. Per la artikoleto estas dirita nenio alia krom la ofte ripetata fakto, ke Esperanto apartenas al ĉiu homo, por kia ajn celo li ĝin uzas, ĉu por komerco, ĉu por turismo aŭ scienco, ĉu por amikigo de homaro aŭ male. — Ne sen konsento, laŭstile, raportas la 9. XI. gazeto „Čech“, pri ia kontraŭesperanta broŝureto, kies skribinto volas pruvi, ke nenio estas pli facila ol krei novan lingvon internacian, sed, laŭ li estas tre malfacile eltrovi lingvon, kiu dirus klare, ke dufoje du estas kvar (?), ke — fine — Esperanto estas juĝata de scienculoj francaj malfavore!! Per tia artikolo oni ankaŭ informas pri la progresoj de mondo? — Serion de tre bonaj notoj oni legis en gazeto „Snaha“ (Prostějov, Moravio): Mezinárodní kongresy a Esperanto. Tisk a Esp. Vojenský svět a Esp. Jules Verne, čestný předseda esp. klubu v Amiensu. Esp. výstava a přednáška v Prostějově. Esp. hnutí a studentstvo v Prostějově. Pri la ekspozicio kaj parolado skribis ankaŭ „Hlas Lidu“, „Hlasy z Hané“, „Zpravodaj“. - „Lidové Noviny“ (Brno, 25. XI.): Esperanto prohlášeno za světovou pomocnou řeč. „Hlas Národa“ (27. VIII.): Esperanto na jevišti. — „Národní Obzor“ (24. VIII.): Esperanto jako prostředek Kristův a ďáblův zároveň. — „Náš Kraj“ (Tišnov, 19. IX.): Esperanto. — Tradukaĵojn el Esperanto enhavis: „Obnova“ (el Espero Katolika). Práce (el Socia Revuo).

# BIBLIOGRAFIO.

Kelkaj n o v a j gazetoj, fonditaj en lastaj monatoj, sciigas al ni interesajn novajojn el landoj, kiuj ĝis nun estis por ni fermitaj pro nehavo de nacia organo.

„F i l i p i n a E s p e r a n t i s t o". Monata Organo de Philippines Esperanto Association. Manila. P. O. Box 326. Mac Cullough Building. (16 pĝ. 17 × 26.) Prezo: 1·50 P.; unu ekz. 20 cent.

„V e r d a S t e l o". Organo de Centra Meksika Societo Esperantista. Monata revuo redaktata de Dr. A. Vargas. Mexico. 3-a del Relox. n-o 12. Distrito Federal. Botica. (16 pĝ. 13 × 20.) Prezo: S 1·00.

„A m s t e r d a m a P i o n i r o". Officieel Orgaan der Eerste Amsterdamsche Esperantisten-Vereeniging. Redaktoroj: H. Blok. J. de Haan. G. Anneveldt jr. en Amsterdam. Singel 386 (12 pĝ. 14 × 21). Prezo F. 1·20 (1 Sm).

„E s p e r a n t a A b e l o". Eliris jam du numeroj de tiu ĉi interesa revueto, kiun redaktas Dr. Achille Tellini en Udine (Italujo). Prezo de unu ekz. 2) cent. (8 Sd). Lasta numero enhavas bildojn el Udine. (17 × 25).

„L a b o r o". Esperanta monata bulteno de „Tutmonda Labora societo" kaj speciala organo por la defendo de la profesiaj interesoj de la oficistaro kaj laboristaro de la tuta mondo. Red.: Louis Carlos. Sekr.: P. Blaise Paris IV-e, 4. rue Bourg-Tibourg. (16 pĝ. 13 × 21). Prezo: 3 Fr

„L a v e r d a s t a n d a r d o". Sub tiu ĉi titolo komencis eliradi la nova jarkolekto (III.) de hungara „Esperanto"; ĝi estas organo de Hungara Esp. Societo kaj de Adriatika Ligo Esperantista. Red.: A. Marich, Budapest IX. Üllői-út. 59. IV. 8. (16 pĝ. 15 × 23.) Prezo: 4 K; unu ekz. 30 hel.

H. T. R j a h o v s k i: S o l v i t a d e m a n d o d e i n t e r n a c i a g r a v e c o. 1907. Bulgara Esperantisto, Sofia. (20 pĝ. 14 × 21).

Bulgara propaganda broŝuro enhavanta krom gramatiko raportojn pri nuna stato de esperanta movado kaj pri la kongresoj.

P r o f. H e c k e r s W o r t s c h a t z für Reise und Unterricht. S y s t e m a t i s c h e r W o r t s c h a t z D e u t s c h - E s p e r a n t o; trad. Dr. A. v. Mayer M. H. 1907. Berlin W.-B. Behr's Verlag. (312 pĝ. 10 × 16·5) Prezo 2 M.

Ĉi tiu biblioteko de frazeologiaj kaj konversaciaj verkoj, gravaj precipe por vojaĝanto, enhavas nun ankaŭ E s p e r a n t o n inter la ceteraj lingvoj vivaj. Estas jam aĉeteblaj eldonoj angla-esp., germana-esp., itala-esperanta. En preparado estas la franca, hispana, dana, pola kaj rusa. Post eliro de dulingvaj frazlibroj sekvos tri-, kvar- kaj seslingvaj eldonoj.

L. de Beaufront: L'Espéranto; ses raisons d'être, sa structure, ses services, sa diffusion. 1906. Paris. Presa Esp. Societo. (85 pĝ. 9 × 15.) Prezo 30 ctm.

La bonega franca propagandilo estas reeldono de konata malnova broŝuro pri Esperanto, konformigita je la nuna stato de nia afero. Multaj modeloj, klarigoj kaj konsiloj faras ĝin tre praktika materialo por la francaj propagandistoj.

Th. Cart: Esperanta Radikaro II. eldono 1907. Presa Esp. Societo. Paris. (88 + 132 pĝ. 9 × 11.) Prezo 60 ctm., kun Clef-Répertoire: 1 Fr. (por la propagando de E. inter blinduloj.)

Tiu ĉi dua eldono diferencas de la unua per tio, ke ĝi enhavas la francan tradukon de la radikoj kaj novajn radikojn private rekomenditajn de Dr. Zamenhof. La radikoj, kiuj ne troviĝas en la Universala Vortaro, estas signitaj per steleto. Oni broŝuris la libreton kun la Clef-Répertoire de Em. Robert. Dank' al tiu ĉi aldono la Radikaro fariĝis tre oportuna kaj malkara vortlibreto Esperanta-Franca kaj Franca-Esperanta, kiun oni povas konstante havi en sia poŝo kaj en kiu troviĝas la plena fundamento de l'Esperanta vortaro kaj la plej akceptindaj el la novaj radikoj.

Rapport sur l'Esperanto adressé à M. le Ministre de l' Instruction Publique par Th. Cart, Agrégé de l' Université, professeur au Lycée Henri IV. et à l' Ecole libre des Sciences politiques, suivi d' une Note sur Esperanto chez les Aveugles. 1907. Paris. Presa Esp. Societo. (24 pĝ. 18 × 22.) Prezo 75 ctm. (por la esp. propagando inter blinduloj.)

Kvankam estas tiu ĉi raporto verkita por Francoj kaj el franca vidpunkto, tamen ĝi estas tre interesa por ĉiuj Esperantistoj, ĉar ĝi resumas ĉiujn argumentojn por Esperanto kaj lerte refutas la atakojn kontraŭ artefarita lingvo. Ĝi estis prezentita de prof. Cart al franca ministro de Publika Instruado okaze de la propono jus farita de M. Cornet al la Ĉambro de la Deputatoj por oficiala akcepto de Esperanto en la publikan instruadon.

Kabe: Internacia Krestomatio. 1907. Librejo M. Arct, Waszawa, Polujo. (107 pĝ. 12 × 18). Prezo Fr. 1·25.

Kolekto da interesaj artikoloj elektitaj el verkoj de Dumas, Ĉehov, Gorkij, Kipling, Niemojewski, Serao, Sienkiewicz kaj Suthner. La konata bela stilo de aŭtoro rekomendas mem legadon de la libro.

N. V. Gogol: La Revizoro. Komedio en kvin aktoj. El rusa lingvo tradukis Dr. L. L. Zamenhof. 1907. Paris. Hachette & Cie. (99 pĝ. 15 × 20). Prezo Fr. 1·50.

Andersen: La virineto de Maro. Tradukita de Dr. L. L. Zamenhof. Ilustrita de Hilda May Brodie. 1907. Paris. Hachette & Cie. (42 pĝ. 14 × 21). Prezo: Fr. 1·50.

Ĉiu leganto de „La Revuo“ kaj de „Fundamenta Krestomatio“ konas allogajn tradukaĵojn de nia majstro. Formato de nomataj libroj, elirantaj en „Kolekto Esperanto: Verkaro de Zamenhof“ estas moderna, kvarta.

L. L. Zamenhof: Fundamento de Esperanto Tradukita laŭ la permeso de la aŭtoro de Konstantino Kuluri. Eldono GREKA. 1907. Paris. Hachette a Cie. (105 pĝ. 11 × 17·5). Prezo 1 Fr.

L. L. Zamenhof: Fundamento de Esperanto. Tradukita laŭ la permeso de la aŭtoro de Rosa Junck. Eldono ITALA. 1907. Paris. Hachette & Cie. (93 pĝ. 11 × 17·5.) Prezo 1 Fr.

En la kolekto „Verkaro de Zamenhof" aperas du libroj gravaj por nia propagando. Post franca, angla, rusa, germana, pola kaj hispana eldonoj de nia fundamenta lernilo sekvas la greka kaj itala, kiuj vere estis jam urĝaj. Ni atendas baldaŭan aperon de pluaj por Hungaroj kaj Rumanoj.

Theodor Storm: Imenlago. El germana lingvo tradukis Alfred Bader. 1907. Paris. Hachette & Cie. (37 pĝ. 15 × 21.) Prezo 75 ctm.

Tiu ĉi melankolia idilia rakonto aperis jam unufoje en „La Revuo". En ĝia „Kolekto" ĝi prezentas belan kaj legindan verkon.

C. Bourlet: L'Espéranto. Conférence aux officiers de l' école supérieure de marine. 1907. Paris. Hachette & Cie. (32 pĝ 11 × 17.) Prezo 50 ctm.

La agema prezidanto de „Groupe Esperantiste de Paris" tre interese kaj detale klarigas signifon de Esperanto kaj ĝian progreson, rekomendante ĝin al maristaj oficiroj. La broŝuro taŭgas kiel bona propagandilo franca.

Jean Bach-Sisley: Rakontoj al mia belulino. Kun permeso de la aŭtoro el franca lingvo esperantigis L. Touchebeuf. 1907. Paris. Presa Esperantista Societo. 33. rue Lacépède· (134 pĝ. 13 × 19.) Prezo 2 Fr.

La ĉarmaj noveletoj, tradukitaj en stilo facila kaj fluanta, elegante presitaj, plaĉos al ĉiu kaj povas esti legataj de ĉiuj, de beluloj, de belulinoj, kaj de tiuj, kiuj estas nek beluloj nek belulinoj.

G. T. Fechner: Libreto pri transmorta vivo. El la germana lingvo tradukis P. Kadik. 1907. Paris. Presa Esperantista Societo. (68 pĝ. 11 × 17.) Prezo 75 ctm.

Tre interesa scienca kaj filozofia studaĵo eltirita el „Internacia Scienca Revuo", skribita tre bonstile.

R. Anton: Esperanta-Germana Frazlibro de la ĉiutaga vivo. Deutsche und Esperanto-Gespräche über Alltägliches. Prilaboris J. Borel. 1907. Berlin S. 42. Esperanto-Verlag. Möller & Borel. (63 pĝ. 11·5 × 17.) Prezo 50 pf.

La nomo de tradukinto garantias bonegan stilon esperantan; la libro estas bezona ne sole al samideanoj germanaj, sed ankaŭ al niaj amikoj fremdlandaj, kiuj vizitos la Dresdenan kongreson, ĉar la frazlibro same povas servi por instrui la germanajn frazojn per helpo de Esperanto.

Dr. L. L. Zamenhof: Taschenwörterbuch Deutsch-Esperanto und Esperanto-Deutsch. 1907. Berlin S. 42. Esperanto-Verlag Möller & Borel. (137 pĝ. 10 × 15.) Prezo 1 M.

Tre praktika, negranda libreto enhavas krom germana-esperanta ankaŭ esp.-germanan kolekton de ĉiuj vortoj plej ofte uzataj en ĉiutaga vivo. Gia malalta prezo ebligas al ĉiu ĝin posedi.

Prof. Richet: Paco kaj Milito. El franca lingvo kun permeso de aŭtoro tradukis Dr. Vallienne 1907. Paris. Presa Esperantista Societo. (50 pĝ. 14 × 19.) Prezo 75 ctm.

Gaston Moch: Pri Malarmo. Ĥimeroj kaj Realaĵoj. 1907. Paris. Presa Esp. Societo. (28 pĝ. 14 × 19.) Prezo 25 ctm.

D'Esturelles de Constant: Limigo de l'Armadoj. Raporto al la 14-a Interparlamenta Konferenco. Trad.: Esselin, Dufeutrel kaj Segétinat. 1907. Paris. Presa Esp. Societo. (51 pĝ. 14 × 19.) Prezo 75 ctm.

A. H. Fried: La Problemo de l'Malarmo. Trad. Kapitano Alesiano. 1907. Paris. Presa Esp. Societo (23 pĝ. 14 × 19.) Prezo 50 ctm.

R. Laisney kaj G. Moch: Por la Dua Haga Konferenco. (Opinioj, projektoj, proponoj.) Enketo farita de la internacia instituto de paco. 1907. Paris. Presa Esp. Societo. (89 pĝ. 14 × 19.) Prezo 1 Fr.

Nomitaj kvin verkoj eliris en la „Libraro Pacifisma" sub n-oj 6. 9. 10. 11. kaj 14., kiun eldonas la societo „Pacifisto". Ni devas danki por tiuj ĉi bele skribitaj verkoj unuavice al redaktoro de „Espero Pacifista", s-o Gaston Moch, kiu konatigas nin kun la nobla movado celanta forigon de brutalaj moroj (moroj?) sangavidaj, forigon de militoj, de tiu abomena makulo de civilizacio. Certe multajn legantojn trovos tiuj verkoj, kiuj tiel klare dokumentas la senfundamentecon de buĉado de homoj.

Pri novaj trigonometriaj sistemoj, originale verkita de prof. A. Dombrowski. — Pri unu speco de kurbaj linioj koncernantaj la V-an Eŭklidan postulaton de prof. A. Dombrowski, 2 eldono. — Méthode Palmer à l'usage des Français. — Esperanto, propaganda broŝureto por islandanoj. — Pri Esperanto per Esperanto de P. Ahlberg. — Sur vojo al kunfratiĝo de popoloj, A Saĥarov. — Esperanto. La ĉiutaga vivo de Swagers & Finet. — La kontinuo, elementa teorio starigita sur la ideo de ordo kun aldono pri transfinitaj nombroj, de Huntington, trad. R. Bricard. — Un bien beau leurre (Tre bela tromplogilo) de L. de Beaufront. — Mallumaĵoj de Abonyi Árpád, trad. Lengyel Pál. — A Grammar and Commentary on the int. language Esperanto by Major-General G. Cox. — Hispana Jarlibro 1907. — La monaĥejo ĉe Sendomir de F. Grillparzer, Edziĝa festo en Capri de Paul Heyse, Unua Ĉapitro el ama vivo de l' naturo de W. Bölsche, tradukitaj de L. E. Meier. — A nemzetközi segédnyelv, L. Couturat, hung. traduko de G. Rados. — La muelilo, kiu ne plu turniĝas, de René Bazin. trad. R. Badert. — Sinjoro Ba-

# OBSAH — ENHAVO.


Našim čtenářům . . . . . . . . . . 1
Al niaj legantoj . . . . . . . . . . 2
Rememoroj de l'Esperantistino. *M. P.* . . . . . . . . . . 2
Esperantaj gazetoj . . . . . . . . . . 16
Gravaj leteroj (1 ilustraĵo) . . . . . . . . . . 17, 65
La propaganda problemo solvita . . . . . . . . . . 18
Instruistoj kaj Esperanto. *Hermann Alferi.* . . . . . . . . 20. 36
„Bohema Mezzofanti" Čeněk Šercl mortis . . . . . . . . . 31
La fero . . . . . . . . . . 31
Niaj kongresoj . . . . . . . . . . 33
Nekrologio (Dr. E. Javal) . . . 35
Delegacio por enkonduko de helpa lingvo internacia. *Bohuslav Pour.* . . . . . . . . . . 38
La tria kongreso . . . . . . . . . . 49
Esperanto — espero de la blinduloj (2 ilustraĵoj). *V. Riegel* . 50, 72
Ruĝa kruco kaj lingvo internacia. *Observanto.* . . . . . . . . 53
Bohema Unio Esperantista . . . . . . . . 64, 65, 87, 129
La tutmonde konata bohema bierindustrio. — *z kaj ing. H.* 67
Internacia helpa monsistemo . . . . . . . . 69
Perioda literaturo de Esperanto (1 ilustraĵo) . . . . . . 82
„Poste sekvis la toastoj." *Dr. J. L. Hrdina. Trad. P. N. v P.* . 92
20-a jubileo de Esperanto (1887—1907) . . . . . . . . . 95
J. M. Bakalář-Srbecký (1 ilustraĵo) . . . . . . . . . . 103
Nia literatura konkurso . . . . . . . . . 111, 131
Tria universala kongreso de Esperanto. Cambridge 1907 . . . 113
Unua legolibro *Dr. Kabe.* . . . . . . . . . . 138
Tri reĝoj. *J. Neruda. Trad. „Š. M. K."* . . . . . . . . 133
Vampiro. *J. Neruda. Trad. „Mi".* . . . . . . . . . 135
I. Příloha Č. Č. E. . . . . . . . . . . 140

* *

Cizí kronika . . . . . . . . . . 10, 25, 41, 55, 98, 144
Kroniko nacia . . . . . . . . . 6, 22, 43, 57, 74, 111, 146
Informoj pri bohema nacio . . . . . . . . 14, 32, 61, 77, 108
Gazetaro . . . . . . . . . . 24, 45, 58, 75, 102, 148
Bibliografio . . . . . . . . . 12, 28, 46, 58, 76, 103, 150
Telefono . . . . . . . . . . 30, 62, 78, 109, 154